

Eŭropa Bulteno

oktobro 2006, № 9 (51)

De la redakcio...

Karaj gelegantoj,

En ĉi tiu numero de Eŭropa Bulteno, mi anoncas multajn interesajn novaĵojn. Vi povas legi pri agado de esperantistoj okaze de Eŭropa Linva Tago, sukcesa vespermanĝa debato en Bruselo, tutmondeco de Esperanto, interkultura dialogo, Eŭropa ekonomia forumo kaj kongresaj novaĵoj.

Se vi opinias ke ni ion preterlasis, bonvolu atentigi nin al niaj adresoj fine de la Bulteno, kaj mi ĝoje aperigos viajn artikolojn en la posta numero. Fotoj estas bonvenaj, kiel ĉiam.

Agrablan legadon,
Vesna Obradović



LA 26-a DE SEPTEMBRO - EŬROPA LINGVA TAGO



En multaj eŭropaj landoj, esperantistoj preparis diversajn aktivadojn rilate al la Eŭropa Linvga Tago. Jen raportoj el kelkaj landoj.

El Kopenhago, Danio:

La dana organizo Komunikada- kaj lingva forumo aranĝis seminarion pri komunikado kaj lingvoj, kadre de tutmondiĝo kaj interkultura komunikado. Por mi estis precipe tre interese aŭskulti la kontribuon de Claus Haugaard Sørensen (dano), ĝenerala direktoro de la Ĝenerala Direkcio por Komunikado de la Eŭropa Komisiono, kiu parolis pri nova komunikadstrategio kaj vizio de komunikado en EU, pri sukcesoj kaj malsukcesoj de komunikado al la loĝantaro de EU fare de la Komisiono, kaj liaj personaj spertoj en tiu kampo.

Post la prelego mi aliris lin kaj donis al li la novan DVD "Esperanto Elektronike" informante lin ke ĉiuj EU parlamentanoj ricevos ekzempleron. Mi pardonpetis ke la kovrilo estas en Esperanto, sed li respondis: ne gravas, mi komprenas! Mi demandis ĉu li scias pri niaj klopodoj enkonduki Esperanton en EU kaj li respondis: jes, kaj vi ne bezonas varbi min, ĉar mi estas pozitiva tiurilate!

Ileana Schröder

El Stokholmo, Svedio:

Venis aŭtobusoj kun gelernantoj por spekti ekspozicion pri lingvoj de Eŭropo. Sur nia tablo ni havis:

- Broŝurojn pri 24 eŭropaj lingvoj interalie pri esperanto (bona kontaktilo), mi demandis ĉu ili jam vidis/aŭdis esperanton.
- La gazeton "la Lingvo Esperanto"



- La ŝlosilon Esperanto-Sveda
- La libreton "Enkondukko al Esperanto" (en la sveda)
- La DVD-on kiun Esperanto@Interreto preparis (speciale al lingvoinstruistoj ni disdonis ĝin)
- Etan Esperanto-butonon por disdonado (la gelernantoj plej ŝatis ĝin)

Estis sukcesa tago kie ni renkontis gejunulojn.

Nia venonta granda ekspozicio estos la "Lerneja Forumo" ekde la 30-

a de oktobro ĝis la 1-a de november <http://skolforum.stofair.se/10154/index.asp>

**Ulla Luin kaj Kaisa Hansen****El Luzano, Svislando:**

La oktobra agotago fariĝis en Svislando septembra agotagdeko.

Sukcesa informado pri Esperanto, 15-24 septembro 2006

« Comptoir Suisse » estas la plej granda nacia foiro kiu okazas ĉiujare en Lŭzano. La temo de la ĉijara (87a) ekspozicio estis "Développement durable" (Daŭropova evoluo), la futuro de la planedo, kiu ricevis 280'000 vizitantojn el tuta Svislando.

Jen la unuan fojon ke esperanta organizo estas inter la ekspoziciantoj: Svisa Esperanto-Societo ĉeestis en speciala ekspozicio de la foiro: "C'est beŭ la vie...?" (Ĉu belas la vivo...?), kadre de la temo "komunikado".

La evento komenciĝis vendrede la 15an de septembro 2006. SES ricevis lokon en la parto de la ekspoziciejo kiu estis rezervita por societoj kunlaborantaj en la realigo de tiu speciala projekto.

Tiuj personoj, kiuj el la arego de preskaŭ tricentmil vizitantoj de la foiro decidis informiĝi pri la problemoj de nia tero, de ties loĝantaro kaj futuro, eniris la labirinton kun komputila identigilo enmane. Laŭvizite, ili devis decidi pri agoj, konduto tra sia vivo kies naskiĝlokon difinis hazarde la komputila ludo, pretigita far studentoj de la Universitato de Luzano. Survoje ili renkontis enmurajn ekranojn kiuj prezentis diversajn filmetojn ripetigintaj senhalte dum la tuta tago. Inter tiuj troviĝis, en angulo pri komunikado, filmeto prezentanta Esperanton. Antaŭ atingo de la elirejo, ludanto-vizitanto povis renkonti niajn deĵorantojn ĉe la ekspozicieto de informiloj, apud granda surmura afiŝo pri Esperanto kaj SES. Elirinte, la vizitanto ricevis printitan diagramon kaj informojn pri la efikoj de siaj agoj al la tero kaj al ties loĝantaro dum simulita vivperiodo.

Estis tre bona decido partopreni tiun specialan ekspozicion, anstataŭ havi budon inter kaserolvendantoj kaj komercistoj de ĉiopova polvosuĉilo, ie en alia angulo de la grandega foiro. Tiel, ni ricevis la viziton de la bonaj personoj, tiuj kiuj estas mense malfermitaj kaj serioze

interesiĝas pri la hodiaŭaj problemoj influantaj nian tre proksiman futuron. Meznombro po inter 10-20 serioze interesiĝantaj personoj venis al ni tage por paroli pri Esperanto. Sed entute estis multe pli da vizitantoj kiuj almenaŭ ricevis bonajn informojn de kompetentuloj pri la Internacia Lingvo.

Laŭparolile disaŭdigitaj diskutrondoj pri diversaj temoj, problemoj ligitaj al la daŭropova evoluo, same havis siajn alparolantojn esperantistajn: a) per la ĉeesto de Nicole Margot (redaktantino de "Etnismo"), en tiu pri tutmondigo kaj egaleco, b) per la kontribuo de Stefano Keller (sekretario de SES) en la debato pri interdependeco kaj pri ekapero de rifuĝintoj pro klimataj ŝanĝoj. La publiko de tiuj konversacioj povis ekscii pri la agadoj de esperantistoj en tiuj kaj najbaraj kampoj kaj konvinkiĝi pri la realeco kaj funkciado de la esperanta mondo.

La prelego, dum kiu Mireille Grosjean (kunprezidantino de SES) prezentis Esperanton pere de vortoludo, same altiris aŭskultantojn en la forumejon, ĉe la enirejo de la speciala ekspozicio.

Entute, oni povis observi ke iĝis afero tute natura kaj normala aŭdi aŭ paroli pri Esperanto en la foiro. Diversaj tekstoj, informiloj kun retligoj, unua leciono de perkoresponda kurso, la DVD Esperanto Elektronike, muzika KD kaj esperantaj periodaĵoj estis donacitaj al interesiĝantoj.

Kontaktoj kreiĝis kun pluraj instruistoj, universitataj profesoroj, studentoj, gejunuloj kaj aliaj personoj el plej diversaj profesioj. Eĉ lokaj politikistoj haltis ĉe nia budo por pozitive interparoli pri Esperanto. Ekĝermis projektoj pri kunlaboro kun evoluhelpaj organizoj kiuj invitis nin al siaj kunvenoj por paroli pri Esperanto. Baldaŭ ni kunsidos kun studentoj de la altlernejoj EPFL kaj UNIL, por diskuti kunlaboron pri traduko de ilia informmaterialo. Unu el la profesoroj renkontitaj jam eklaboris kun ni pri projekto enkonduki instruadon de Esperanto en liaj instituto kaj kursoj altlernejaj.

En la spirito de interdependeco, la speciala ekspozicio estos prezentata ankaŭ en aliaj urboj, landoj por atentigi ankaŭ aliloke pri la neceso ŝanĝi nian konduton, por agi kune favore al la tero kaj al la tuta homaro. La respondeculoj de tiu projekto antaŭvidas eĉ ĉeeston de la speciala ekspozicio en venonta Universala Kongreso de Esperanto!

La 10-taga evento, kiun ni vere povas taksi sukcesa, realiĝis dank' al kunlaboro de sindonemaj deĵorantoj..

Stefano Keller

El Maribor, Slovenio:

Okaze de Eŭropa Lingva Tago slovena nacia televido (unua programo) kadre de la matena programo Dobro jutro (Bonan matenon) elsendis intervjuon kun la aŭtoro de la libro »Eŭropo, vi baldaŭ mortos« Zlatko Tišljar la 25-an de septembro. Temas pri slovena traduko, kiun faris Vinko Ošlak, de la libro originale verkita en Esperanto. La intervjuantino montris ankaŭ la originalan libron en Esperanto kaj oni menciis Esperanton plurfoje, parolante pri ĝi kiel normala lingva fenomeno sen aludo al »artefariteco« aŭ »nenatureco«... Poste estis eta ludo en kiu la intervjuantino invitis la spektantojn respondi al la demando kiu persono estos sur la slovena monero de unu eŭro. La venkantino ricevis premie la libron.

La elsendo estis samtage ripetita en la regiona maribora televito TELE-M. Tiel la intervjuon spektis kelkcentmil homoj.

La libron mem la aŭtoro prezentis ankaŭ publike en Maribor en la Popoluniversitato la 26-an de septembro.

Zlatko Tišljar

LA VESPERMANĜA DEBATO EN BRUSELO



Etsuo Myoshi

La vespermanĝa debato en Bruselo, kiun iniciatis kaj financis japana esperantisto Etsuo Myoshi, okazis la 3-an de oktobro kaj estis sukceso. Ĝi daŭris de la 20.00a horo ĝis post la noktomezo! Mi unue klarigis ke nia celo ne estas esperantistigi la gastojn dum la vespero, sed stimuli debaton pri ŝlosile grava elemento de la eŭropa integriĝo, kaj plilarĝigi tiun debaton al aferoj kiel la ebla kontribuo de neŭtrala lingvo, kiuj kutime estas neracie, nescience kaj antŭjuĝe forigataj de la debato. Ĉeestis kelkaj gravaj kaj influhavaj homoj:

1. Prof. Hugo Baetens Beardsmore, kiun la Komisiono ofte konsultas pri lingvopolitiko, kaj kiu longjare faris projektojn en lingvoinstruado por la Konsilio de Eŭropo.



2. Prof Philippe van Parijs, tre konata filozofa, kiu nuntempe estas verkanta libron pri lingva justeco. Li estas konata kiel apoganto de la angla, sed dum la debato li tre zorgeme aŭskultis niajn diskutojn en Esperanto, aparte kiam Margareta Handzlik kaj Etsuo Miyoshi parolis, kaj li poste diris ke "Bezonatas komuna lingvo por la efikeco de EU. Mi ĉiam favoris la anglan, sed eble ankaŭ estas argumentoj por neŭtrala lingvo, kiu privilegigus neniun."

3. Konstanta Reprezentejo ĉe EU, kiu respondecas pri lingva politiko kaj pri la "frankofonio".

3. Marc-Olivier Gendry, alt-ranga diplomato en la franca

4. Belga diplomato Jan Bayart, kiu parolas denaske nederlande, sed komprenas la gravecon de la franca. Li "bedŭrus vidi generacion en Flandrio kiu parolus angle sed ne plu france." Li la unuan fojon aŭdis Esperanton. Kaj li kaj Prof Baetens-Beardsmore zorge rigardis la (sufiĉe grandan - 45 libran) libro-ekspozicion kiun mi faris sur 2 tabloj apud nia manĝotablo.



5. Ĉeestis esperantistoj Margareta Handzlik, Jozef Reinart (kiu nun reprezentas Slovakion en Belgio, kaj sukcesis inviti la 2 profesorojn al la Bratislava konferenco

en novembro), Flory Witdoeck (kiu tre trafe komentis dum la diskuto, kaj ankaŭ zorge tradukis por Etsuo Miyoshi), kaj Guido Ricci.

6. Ĉiuj 107 franclingvaj EP-anoj ricevis mian franclingvan artikolon, kiu publikiĝis printempe en "Les Langues Modernes". La lasta respondo venis de kataluna EP-ano, Bernat Joanmart, kiu verkis la malneton de EP-raporto pri la Komisiona komunikado pri multlingvismo de novembro 2005, kiu ankoraŭ ne estis adoptita de la Parlamento. Li skribis ke li tre ŝatus veni al nia diskuto, sed bedaŭrinde ricevis samtempan inviton de la prezidanto de Katalunio. Mi tuj respondis kaj invitis lin tagmanĝi aliffoje. EEU daŭrigos la kunlaboron kun membroj de la Eŭropa Parlamento, kaj de la aliaj EU-aj institucioj.

Dr Seán Ó Riain

LA TUTMONDECO/EŬROPECO DE ESPERANTO

Unue, mi agnoskas ke multaj Esperantistoj estas tradiciemaj. Tio ne devas esti malbona afero, sed ĝi povus fariĝi malbona se la movado provus trudi tiun pensmanieron al aliaj. Tio ne estas la sola ebla pensmaniero, kaj se Esperanto favoras toleremon, ni devos trovi manieron kaj konservi niajn proprajn pensmanierojn (kaj identecojn: mi havas fortan irlandan identecon, kaj Eŭropan identecon, kiuj harmonias kun kaj ne kontraŭas mian Esperantan identecon) kaj harmonie kunlabori. Fakte mi tre ŝatas aliajn mondpartojn, pasigis ekzemple 2 ĝojplenajn jarojn en Aŭstralio, kaj bone kaj efike ĉiutage kunlaboras kun mia japana amiko, Etsuo Miyoshi, ekzemple. Por klarigi mian pensmanieron: Se Hindio, ekzemple, donus oficialan rolon al Esperanto, kaj neniu alia lando farus tion, la lingvo vole nevole alprenus hindian identecon, ĉar identeco estas nedisigebla parto de ĉiu lingvo. Oni simple ne povas uzi lingvon sen akcepti la identecigan econ kiun ĝi havas. Same, se EU donus oficialan rolon al Esperanto, kaj aliaj mondpartoj ne, Esperanto vole nevole alprenus eŭropan identecon, sed tio tute ne malhelpas (kaj male, eĉ povos ege helpi) la tutmondigon de Esperanto, ĝuste kiel la usona identeca rolo de la angla tute ne malhelpas tutmondigon de la angla, kaj male, multe helpas ĝin.

En nia Eŭropa Forumo en Florenco mi ne ricevis respondon al mia centra demando, kaj pro tio mi nun ripetas ĝin: ĉu la fakto ke la angla esprimas usonan identecon iel bremsas ĝian tutmondigon kaj ĝian lernadon en aliaj mondpartoj? Se ne (kaj ja evidentas ke ne!), kial eŭropa (ŭ afrika, ŭ hindia, ŭ sudamerika) identeco por Esperanto povus iel bremsi la tutmondigon de la lingvo?

Ĉu iuj proponas, por eviti ĉian ligan de Esperanto kun eŭropa identeco, ke, se EU decidus doni rolon al Esperanto en EU, la Esperanto-movado devus kontraŭi tion, kaj diri "EU, ne nun, bonvolu atendi ĝis la tuta mondo akceptos Esperanton, ĉar ĝi estas tutmonda kaj ne eŭropa lingvo". Tio estus rekte kontraŭa al la Zamenhofa "paŝo post paŝo"- EU estas paŝo al tutmondeco, kaj sen ĝi, mi konvinkiĝis, ke Esperanto neniam havos tutmondan rolon ekster la eta Esperanto-komunumo. Ĉu tion ni fakte volas? Ĉu kelkaj el ni kaŝe fariĝis raŭmistoj?

Mi forte volas unuecon kaj harmonion en la Esperanto-movado en EU. Pro tio mi tiom forte substrekis en Florenco ke neniu Esperantisto devus kritiki alian Esperantiston ĉe ne-Esperantisto. Unueco estas forto, kaj ni bezonas ĉiun eblan forton. Pri la frazo: "**Aldone Esperanto havas unu gravan econ: per sia logika strukturo kaj gramatiko ĝi plibonigas la sekvan studadon de aliaj lingvoj.**"

Taktike ĝi estas ege bona, kaj eble eĉ la plej bona, ŝlosilo por malfemi mensojn al la ideo de Esperanto. Tio estas mia propra sperto, aparte en la sukceso enigi tre pozitivan artikolon pri Esperanto en irlandana nacia gazeto, "Irish Examiner" en julio, kiu estas menciita dufoje de nia nacia radio tuj post la matenaj novaĵoj, kaj kiu aŭdigis la vorton "Esperanto" al ĉiuj irlandanoj.

En la strategia aliro de EEU ege gravas **fleksebleco**: ni uzu la "eŭropan identecon" kun la EU-aŭtoritatoj kaj kun ĉiuj kies intereso estas la sukceso de EU, sed kompreneble ne kun naciistoj aŭ aliaj kiuj kontraŭas la tutan ideon de EU. Kun ĉiuj siaj mankoj kaj malfortecoj (kaj ĝi havas multe), sukcesa EU, por mi, estas la sola alternativo al usona monda dominado, kaj por mi tute klaras ke ĉiuj kiuj kontraŭas la eŭropan integriĝon objektivite (eĉ se li/ŝi mem ne konscias tion) helpas la usonan dominadon de la mondo. Mi mem havas neniajn kontraŭ-usonajn emojn, sed nur kredas ke la egaleco de civitanoj kiu tre gravas ene de Usono ankaŭ gravas por la tuta ekster-usona mondo.

Dr Seán Ó Riain

INTERKULTURA DIALOGO LAŬ LA VIDPUNKTO DE LA DEBATESTRO

Por montri kia estas la kutima sinteno de politikistoj, jen mia persona resumo de tio kiel kondukis la Debatestro kiun komisionano Walstrom dungis por "moderigi" sian rettaglibron (ĉi tiu resumo estas parto de letero kiun mi sendis al la tradukgrupo...):

La sinteno de la Debatestro estis rimarkinde "politik-ec-a /politik-ec-aĉ-a": tio estas sinteno kiu celas kredigi la civitanojn ke ŝi/li samopiniis kiel ili, dume ŝi/li agas tute alimaniere... Fakte, jen mia persona resumo de tio kion ŝi/li faris: tiu debatestro estas la sama persono kiu pasintece, en tiu rettaglibro, diradis ke Esperanto ne ekzistas, kaj ke neniu parolas ĝin... Post plendoj de esperantistoj, ŝi/li komencis diri ke plur-lingv-ig-o de la forumo estas tute ne ebla afero, kaj defiis la esperantistojn traduki aĉet-liston en ĉiujn EUajn oficialajn lingvojn - pensante ke nia malsukceso estus pruvonta ke ŝi/li pravas. En la daŭro de malmultaj horoj la traduko de la aĉet-listo estis jam preta, sekve ŝi/li diris ke la forumo estas tre pli komplika afero, kaj ke nia sukceso pri la aĉetlisto ne pruvas ion; kaj ĝuste tiam alvenis ni, studentoj, pensiuloj, normalaj civitanoj kun normalaj profesioj, kiuj sukcesis plur-lingv-ig-i etan parton de la forumo. Kion respondis ŝi/li, kiu antaŭe diris ke la forumo estas nurangla nur pro praktikaj kialoj, t.e. pro la nediskutebla ne-ebleco plur-lingv-ig-i la mesaĝojn? Ŝi/li afable komprenigis al ni: ne uzu ĉi tiun forumon, uzu alian forumon kiu nomiĝas "Debate Europe". Kion faris Leo kaj aliaj? Ili simple iris kontroli kio estas tiu "paradizo" de plurlingvismo kaj malkovris ke temas pri ridindaĵo kaj kontraŭstaris la rettaglibran Debatestron rekte per priskribo de konkretaj faktoj ene de nia naŭa plurlingva letero - interalie: Leo ne estas la ununura samideano kiu malkovris la ridindecon de "Debate Europe": jam alvenis al mi aliaj tiurilataj atentigoj... -. Nia tuta laboro, nia ekzistado mem, estas daŭra - kaj ĝena - refutado de la senbazaj opinioj de la Debatestro!... Fakte mi planis nian traduk-projekton ĝuste por daŭre kaj daŭre refuti ŝin/lin per konkreta traduk-agado... La epilogo estis ĉi tiu: la lasta mesaĝo de Hju aperis nur post unu semajno de "moderigado" /"debatestr-ado" fare de la Debatestro (kutime oni atendas nur, pli malpli, dum 48 horoj)!

Andrea Fontana

EŬROPA ESPERANTO-UNIO EN EKONOMIA FORUMO DE ORIENTA EUROPO

En turisma kaj kuracurbeto de suda Pollando Krynica okazis inter la 6a kaj la 8a de



septembro 2006 la 16a ekonomia forumo de orienteŭropaj kaj mezaziaj landoj. Partoprenis 1600 personoj de politika, socia kaj ekonomia vivo de 16 landoj. Reprezentiĝis grandegaj kompanioj, kompanigrupoj, banksistemoj kaj multaj

politikaj personoj. La aranĝo estas kvazaŭ antipoda al simila renkontiĝo de potenculoj de la plej riĉaj landoj en Davos en Svislando.

La centra temo de la Forumo ĉi-jare estis Eŭropa identeco. En tiu societo de potenculoj troviĝis ununura neregistara neprofesia organizaĵo: Eŭropa Esperanto-Unio, dank al escepta klopodo de pola esperantistino Halina Komar. La Forumon malfermis per siaj paroladoj kvin registarprezidantoj: prezidanto de Pollando, de Litovio, de Latvio, de Ukrainio kaj de Kartvelio, kiuj klopodis difini la signifon de eŭropa identeco kaj kiel ili tion konceptas.

Dum la tri intensaj labortagoj prezentiĝis 140 laborgrupoj pri tre diversaj temoj. Inter ili en sekcio Kulturo kaj Edukado la temon Lingva ekonomio organizis Eŭropa Esperanto-Unio kiel partnero de la Forumo.

La aranĝon gvidis sinjorino Margareta Handzlik, eŭropa parlamentanino kaj prelegis krom ŝi ankaŭ Zlatko Tišljar, sekretario de EEU, Barbara Despiney el Ekonomia Esplorinstituto de Parizo kaj Peter Balaž, prezidanto de E (ĉe) I. Oficialaj lingvoj estis la angla, la pola kaj la rusa. Ĉeestis kvindekda interesitoj. Margareta Handzlik enkondukis la temon prezentinte instituciojn kaj eĉ faris mallongan unuminutan instruon pri Esperanto, Zlatko Tišljar parolis pri rilato inter identeco kaj lingvo, Barbara Despiney montris pli detale iujn ekonomiajn aspektojn kaj lingvan situacion ĉe UNESCO kaj Peter Balaž montris mallongan filmon pri Esperanto. Estis poste aro da intervenoj kaj demandoj. EEU havis krome dum ĉiuj tri tagoj sian reklamstandon ĉe kiu deĵoris du junaj polaj esperantistoj kie pri Esperanto informiĝis kelkdekda interesitoj. La forumon fermis kvar eksprezidantoj de Pollando, Slovakio, Litovio kaj Slovenio.

La forumo estis okazo por EEU-aktivistoj renkonti gravulojn kaj havi plurajn interparolojn kun ili. Krome kiel partnero EEU aperas en la oficialaj dokumentlibroj de la Forumo kaj en progamlibroj en kiuj estis prezentitaj ankaŭ la prelegantoj. Pri la partopreno de EEU do povis informiĝi ĉiuj 1600 partoprenantoj kaj multegaj ĵurnalistoj kiuj sekvis la laboron de la Forumo.

Pro la sukceso de nia unua partopreno ni esperas ke helpe de sinjorino Komar EEU povos partopreni ankaŭ en la sekvajara aranĝo kaj sin ankoraŭ pli bone preparante eluzi la aranĝon pli efike.

Zlatko Tišljar



lingvan staton en EU kaj ĝiaj



Pri nia kongreso...

KONGRESAJ NOVAĴOJ



Eŭropa infana kongreseto okazos ekde la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto en infana ripozejo, en Areh, sur monto Pohorje. Ĝi situas proksimume 25 km de Maribor en supermara alteco de 1246 m. La ripozejon ĉirkaŭas natura arbaro de abioj kaj montaj herbejoj. Bonvolu rigardi

http://www.esperanto-maribor.si/programo_de_kongreseto.html

Monta antaŭkongreso okazos ekde la 21-a ĝis la 28-a de julio en monta vilaĝo Jezersko (906 m). Partoprenantoj loĝos en la malgranda hotelo "Planinka", farita en alpa stilo, proksime de fama Planšarsko jezero (Paŝtista lago) kaj la plej alta akvofalo en Slovenio, Čedca (138 m).

La antaŭkongreso inkludas du tuttagajn ekskursojn: lundan al glaciaj lagoj de Bled kaj Bohinj kaj merkredan al Ljubljana (http://www.burger.si/Ljubljana/Ljubljana_ESPERANTO.htm), Postojna (karsta kaverno) kaj Ŝkofja Loka.



La urbestro de Maribor, sinjoro Boris Sovič, en kunveno (la 5-an de oktobro 2006) kun reprezentantoj de Esperanto-societo Maribor, promesis finance subteni eldonon de urba prospekto en Esperanto bezonata por la kongreso.

Ĝis nun al la kongreso aliĝis esperantistoj el 10 landoj: Pollando, Francio, Rusio, Hispanio, Italio, Portugalio, Ukraĵio, Hungario, Svedio kaj Slovenio.

Vesna Obradović

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 6-an de oktobro 2006.

Redaktorino: Vesna Obradović.

En la numero kunlaboris: Ileana Sôrøder, Ulla Luin kaj Kaisa Hansen, Stefano Keller, Seán Ó Riain, Andrea Fontana, Zlatko Tišljár, kaj Vesna Obradović.

Leterojn kaj komentojn sendu al la sekretario de EEU: zlatko.tisljar@azm-lu.si

Kontaktoj: komunikadcentro@esperanto.org kaj vesna.obradovic@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>